ENHAVO

TRANSVIVI
Eugene DE ZILAH 3
EL VIAJ LETEROJ …
Teodoro BROWNE,
Kees RUIG,
Jean AMOUROUX 10
ŜAKPROBLEMO 'ŜPB-126'
elektita de PASKALO 11
JUDOJ KAJ LA ESPERANTO-MOVADO
Ulrich LINS 12
SUR INSULO DEZERTA …
MAO Zifu 14
MIA DRIVO ORIENTEN
unua epizodo
Kris LONG 15
"ESPERANTO ESTAS PENTEKOSTA FENOMENO …"
IEK '2006 en Rumanio
Johan DERKS 16
CHERPILLOD PRI CHERPILLOD
André CHERPILLOD 21
SENTENCOJ DE AVO KOLJO
Ivan Tr. MINĈEV 25
ILI DIRIS …
Nicu-Aurelian STEINHARDT
tra Ionel ONET 25
NACILINGVA PENSADO kaj esperantlingva kosmo de pensado
Anatolo GONĈAROV 26
EPIDEMIO DE VIOLENTECO
Barbara EHRENREICH
tra Toon WITKAM 30
IEK '2007 EN BULGARIO 31
FLORAJ LUDOJ KAJ esperantistoj-revoluciuloj
Esperanto en Katalunio,
de Antonio Marco BOTELLA
recenzo: Nikolao GUDSKOV 32
KRUCVORTENIGMO 'KVE-126'
MAGDA LENA 33
SPRITE KAJ MODELE
Samideanoj,
noveloj de 21 aŭtoroj
recenzo: Ginette MARTIN 34
ĈU VI JAM SCIAS …?
Madeleine de Zilah 35

OSIEK-PREMIO 2006 al André CHERPILLOD por "Konciza etimologia vortaro de Esperanto"

numero 126 **6a de la 21a jaro** **31okt06**

Karaj Amikoj,

Post IEK en Rumanio – pri kiu koncize raportas Johan DERKS – mi proponis al la nova OSIEK-premiito André CHERPILLOD ke li mem verku artikolon pri si ; ĝojige, revene en *LG*-ejo post 5-monata foresto, mi trovis tekston lian. Gratulon al la senlaca fekunda aŭtoro !

Post longa silento Kris LONG iniciatas serion da artikoloj pri Ĉinio, sekvos WANG Wei, DU Fu … Du kontribuoj pacience atendis trovi spacon en LG, ili fine aperas : subtila dialogo inter Anatolo GONĈAROV kaj Anna LÖWENSTEIN pri tradukproblemoj ; eseo de Barbara EHRENREICH tradukita de Toon WITKAM pri temo daŭre aktuala.

Bonvenon al nova kunlaboranto Ulrich LINS, kiu zorge kaj dokumentite prilumas la strebadojn de judoj krei hebrean E-movadon. Bonan vojaĝon al malnova kunlaboranto MAO Zifu, kiu foriras al dezerta insulo ne kun tri, sed kun nur unu verko, fama teksto OSIEK-premiita en 1999 …

Via redaktoro rakontas kiel kapitano Robertson savas el ŝippereo sian anaron. Jen io tre laŭda pri "baspoj"! Kaj mi dankas ĉiujn aliajn kiuj kunkreis tiun ĉi kajeron.

Madeleine de Zilah

“ESPERANTO ESTAS PENTEKOSTA FENOMENO…”

Kvankam kristana teologio ne vekas ĉies apetiton, oni povis aŭdi jenan aserton de Bruno Masala – “Esperanto estas pentekosta fenomeno” – dum diskuto en la dekoka OSIEK-konferenco, 15-an ĝis 21-a de julio en Timişoara, okcidenta Rumanujo.

La teologianto prelegis tie pri la temo *Oriento en la Biblio*. El Oriento venas kaj bono kaj malbono, li ekdiris, sed en la Malnova Testamento (la juda parto de la Biblio) plipezas la karakterizo de ‘Oriento’ kiel la laŭnatura Di-kompleza vivovojdirekto. Laŭ la Nova Testamento, specifa por kristanoj, homo kiu estas baptita, jam estas ‘savita’. Ĝin kapabligas la Sankta Spirito fari spiritan paŝon direkte al la proksimulo. Ni esperantistoj, plue laŭ Masala, konkretigas tiun paŝon, elektinte alian lingvon ol la propra por internacia komunikado.

Estus neeble preni ekzemplojn de interesaj asertoj el ĉiu unuopa prelego el la riĉa programo en Timişoara. Mi menciu nur tion, kio plej impresis min. Alte tiel la prelego de Fabrizio PENNACCHIETTI (elp. Penakieti) pri *Ritaj aspektoj de la islama pilgrimado*. Li substrekis la riĉecon je ritoj kaj simboloj de la septaga pilgrimperiodo en Mekko.

La hodiaŭa konstruaĵo, nomata Kaaba, ne havas eĉ nur relikvan rilaton al la pagana-kristana templeto, kiu staris tie en 630 (kiam Mohameto konkeris Mekkon). Por islamanoj tamen ne gravas la historia materieco de iu rita objekto, sed la simbola signifo, kiun ĝi ricevas per ĝenerala akcepto. Similaj kubaj konstruaĵoj interne de templo kiaj Kaaba ekzistis interalie en Hatra (Irako) jam antaŭ la tria jarcento.

Alia interesa rimarkigo lia estis ke unuafoje en la historio de Islamo formiĝis reĝimo, kiu kun aŭtoritato povas reinterpreti iun versiklon de Korano: la teokratia reĝimo en Irano. La itala profesoro rigardas tion lumeto de espero por la ĝisdatigo de Islamo, ĉar post la konkero de Bagdad en 1258 far nepo de Ĝengis Ĥano la islama teologio ne pluevoluis.

Tio ĉio laŭel la temo *Kio estas Oriento?*. Atribuo de islamo al Oriento cetere grave incitus la islamanojn mem, ĉar ili konsideras sin apartenantoj al Okcidento kaj suferegas, sciigis Pennacchietti, pro malrekono kiel tiajn far okcidentanoj.

Tiuj socikulturaj problemoj ne tiklis la germanan preleganton Edgar MÜLLER (elp. Miler), kiu prilumis diversajn klimatologiajn procezojn, ligitajn tra la tuta eŭrazia kontinento al la ventodirektoj ŭesto (okcidento) kaj easto (oriento).

Eugène de ZILAH, franca orientalisto, donis al la partoprenantoj ampleksan superrigardon de grandaj orientalistoj ekde la 17a jarcento. Li klarigis la enhavon de la nomoj Proksima Oriento kaj Meza Oriento, samtempe eksplikante, ke kulturhistorie la areo konkerita de Aleksandro (‘Iskandro’ laŭ la persa nomo) la Granda en 323 antaŭ nia erao apartenas al la Okcidenta Mondo. Nur la Malproksima Oriento, etendiĝanta de Hindio (nuntempe Bharato) ĝis Pacifiko, estas en sia tradicia kulturo vere fremda al la reganta en Okcidento vivkoncepto. Li interalie rakontis el la *Vivo de Sandor Kőrösi Csoma*, hungara orientalisto kaj unu el la nur du okcidentanoj kiuj fariĝis ‘bodisatvo’.

En la prelega programo venis el tiu ‘malproksimo’ kontribuoj pri Nepalo kaj Vjetnamujo, en la formo de turismaj observadoj. Toon Witkam prezentis “kiom da Oriento” restas en Vjetnamujo kaj kiajn kontrastajn situaciojn travivas okcidenta vizitanto en la lando.

Bardhyl SELIMI montris grandan serion da belaj bildoj el Albanujo kaj raportis pri la pozicio de sia lando inter Oriento (Bizancio) kaj Okcidento (Romio).

La ĉeforganizanto de la konferenco, d-rino Maria BUTAN, donis abundon da informoj pri la kongresurbo Timişoara kaj ĝia regiono Banato. Maria Butan ricevis varmajn vortojn de Lena de ZILAH kaj longan aplaŭdon dum la ferma kunveno de OSIEK, pro sia fortostreĉo. Danke al ŝi ni povis uzi klimatizitan lokalon de la universitata biblioteko por niaj kunvenoj. Maria Butan ankaŭ aranĝis, ke dufoje ni plennombre riĉe vespermanĝis, duafoje post afabla akceptiĝo de lokaj esperantistoj en la Kultura Domo kaj ĝuego de unuhora popoldancado de la grupo Timişu.

Tamen ne ĉiu partoprenanto estis plene kontenta pri la konferenco, interalie pro fojfoje mankhava lingvonivelo, eble nesufiĉe preparita teksto aŭ eventuale manko de didaktika sentemo. Notindas, ke ĝis nun la gvidado de la societo neniam renkontis iun kontraŭstaron kaj eble ĝuste tial la maniero en kiu la komitato gvidas ne bezonis iun klarigon. Aparte de la respondado pri la financoj far Éric LAUBACHER aliaj estraj taskoj kiel la informado pri la statuto, varbado de prelegantoj kaj ilia konsiligo k.s. ne ricevas publikan atenton.

Observanto ankaŭ povus demandi sin, ĉu tiu grava celo de la societo, proponi forumon al esperantistoj por sperti kolegecan sciencan interŝanĝadon, estas atingata, se la kerno de la partoprenantaro jam dum multaj jaroj grandparte konsistas el la sama trideko da sindonaj fideluloj.

Grava evento estis la aljuĝado de la OSIEK-premio, sume de 600 eŭroj. El la kvin plej multe kandidatigitaj verkoj la du elektitaj per la unua sekreta voĉdonado akiris saman nombron da voĉoj je la dua baloto: *Konciza etimologia vortaro* de André CHERPILLOD (elp. Ŝerpijo) kaj la kunredaktita de pastro Albrecht KRONENBERGER ekumena liturgilibro *Adoru*. Simila situacio jam okazis, antaŭ 10 jaroj, dum IEK-1996 en Poprad (Slovakio): oni do uzis la tiaman proponon de Eduard V. TVAROŽEK, ke la premio iru al Cherpillod, ĉar li estis por tiu verko inter la kvin plej oftaj proponoj ekde 2004, dum Kronenberger por sia verko estis inter la kvin plej oftaj proponoj ekde 2005.

Ankoraŭ estis voĉdono pri la konferencejo en 2008, kiu estos la aŭstra urbeto Wörgl. La tiea temo estos literatura.

Ekster la muroj de la konferencejo ankaŭ estis multo ĝuinda. Timiŝoara havas belegan historian centron, la placo ‘Unitarii’ (de la unueco) estas kvazaŭ multetna centro, kie serbe ortodoksa, rumane ortodoksa, katolika kaj juda preĝejoj kunstaras kun la urbodomo. Ĉu mirinde, ke ĝuste en tiu klera, kosmopolita urbo la revolucio kontraŭ Ceauşescu ekflamis

Estis plezuro tie pasigi tutan semajnon en la etoso de solidareco kaj amikeco.

Johan Derks